n-ro 36

aprilo 1992

ISSN 0941-9306

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo

# La Merkato

## Vizitoj de IKEF-anoj ĉe institutoj kaj fabrikoj en Vieno dum la kongresa semajno kaj avizo de la Ĝenerala Kunveno

Dum la kongresa semajno en Vieno (25a de julio - 1a de aŭgusto 1992) ni planas ne nur nian **Ĝeneralan Kunvenon**, sed ankaŭ - laŭ spertoj de Rotterdam kaj Bergen - **vizitoj** ĉe la unversitato de Vieno kaj/aŭ ĉe fabriko. Aktuale ni estas organizantaj la aranĝojn.
Precizajn datojn pri tiuj vizitoj vi povos legi ĝustatempe en "La Merkato" n-ro 37 de julio 1992.

*La Estraro*

---

## Enhavo:

Estraro, sidejoj, kotizoj, kontoj kaj perantoj ......... 2
Ŝaluton ....................................................**dk** 3
Reeldono de KIU FARAS KION?
Indekso de la mozaj industriaj produktaĵoj ......**FXG/FJB** 3
Administrado - Grava atentigo al niaj membroj! ..**Estraro** 4
Entreprenistaj Strategioj - Priskribo de la entrepreno ...**FJB** 4
Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 1991 ...**Estraro** 5
Membraro denove kreskis .................................. 5
"La Merkato" iom stumblis ................................ 5
Terminara laboro antaŭ nova sukceso ...................... 5
Verka agado malfortiĝis .................................. 5
Statutomodifo ne aprobita ................................ 5
Praktikaj agadoj ......................................... 6
Ĝenerala Kunveno 1991 en Bergen .......................... 6
Resumo ................................................... 7
"monda merkato" helpas ..........................**FJB/Estraro** 7
Komercdeziraj leteroj! ...................................**dk** 9
Financa raporto ..........................................**RR** 10
Bonvenon al niaj novaj aliĝintoj! ....................**RR/dk** 12
Identecŝildaro ...........................................**RR** 12
BOSCH: Ni serĉas mondvaste liverantojn .................**FJB** 12
Rajtoj de represo, Reklamtarifoj ktp. ...................**dk** 12

La Merkato (LM) estas organo de **IKEF**. Ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

La Estraro de IKEF: S-ro Franz Josef **Braun** (FJB), Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland **Rotsaert** (RR), Financa Konsilanto; D-ro István **Gether**; S-ro François-Xavier **Gilbert** (FXG); D-ro Marco **Picasso**; S-ro Seikô **Yamasaki**; S-ro Daniel **Kōnig** (dk).
Revizoro por la financa raporto: D-ro Gianfranco **Polerani**.

Centra sidejo:
Ĉe s-ro Franz Josef **Braun**, Hornisgrindestraße 8, D-w7580 Bühl 16, FR Germanio

Financa sidejo kaj membrara administrado:
Ĉe s-ro Roland **Rotsaert**, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio, *telefono:* +32.(0)50.330004

Redaktora sidejo:
Ĉe s-ro Daniel **Kōnig**, Schwarzwaldstraße 47 D-w6800 Mannheim 1, FR Germanio, *telefono:* +49.(0)621.821710

La jara **membrokotizo** estas 400 belgaj frankoj, 20 nederlandaj guldenoj, 20 germanaj markoj aŭ 10 usonaj dolaroj. Ĉiuj, kiuj intencas kunlabori por subteni la klopodojn apliki Esperanton en komerco kaj ekonomio estas invitataj iĝi IKEF-ano. Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membrokotizo.
Kontoj: Ĉe UEA kaj ĉe FEL, kodo ikef-c, *aŭ* ĉe Belga poŝtĉekkonto, Bruselo n-ro 000-1592629-83, je la nomo de IKEF, p.a. S-ro Roland Rotsaert.

Perantoj:
Francio: S-ro François-Xavier **Gilbert**, Vert Coteau, F-55000 Longeville en Barrois, (CCP 1275-89 L Nancy)
*FR Germanio*: S-ro Franz Josef **Braun**, Hornisgrindestraße 8, D-w7580 Bühl 16, (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)
Hispanio: S-ro Pedro Antonio **Macanás Valverde**, Av. Libertad, 6-2, E-30009 Murcia, (Banco Hispano-Americano 0049, Asoc. Grupo Esperantista "Ricardo Codorníu", n-ro 672-1; Kotizo: 1250 ptas.)
*Hungario*: D-ro István **Gether**, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII
*Italio*: D-ro Marco **Picasso**, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro
*Japanio*: S-ro Seikô **Yamasaki**, 185 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, (Poŝtĝirkonto, n-ro 6-253232; Kotizo: 1400 enoj)
*Jugoslavio*: S-ro Sotir **Taleski**, ul. 'Oslo'br. 12, YU-91000 Skopje
*Togolando*: S-ro Gbeglo **Koffi**, B. P. 13169, Nyékonakpoé, Lomé



## Saluton

Estimataj gesinjoroj, karaj gelegantoj,

denove eta progreso - ĉu menciinda? Laŭ biblioteka vidpunkto iel por gazet(et)oj ISSN-numero nepre necesas. Revuo sen ISSN ne kompletas. Sed, ĉar tio ne sufiĉas por leginda periodaĵo bezonas vian kumunikemon je raportendaj aferoj.

Agrablan legadon deziras



/dk

## Reeldono de KIU FARAS KION?
## Indekso de la mozaj industriaj produktaĵoj

Nia estrarano Francois-Xavier Gilbert, Bar le Duc, Francio, ripetis sian faron de 1986. Kiel direktoro de la Industria kaj Komerca Ĉambro de Bar le Duc, departemento Mozo (Meuse) li ree organizis specialan indekson pri la produktaĵoj fabrikataj en la departemento Mozo. Supozeble vi jam ricevis la 104 paĝan broŝuron de formato A 4.

Laŭdinda kaj imitinda agado!

Kion faros NI kun tio?

Reagi multfacete! Ĉiu de ni skribu esperantlingve al la Ĉambro aŭ al firmao(j), kiu(j) liveras varojn aŭ servojn interesajn al li/ŝi. Kiel profesia aĉetisto mi mem sendos prezdemandojn al taŭgaj fabrikistoj; sed tute ne estas malpermesite por ne-profesiulo sendi leteron pri teknikaj demandoj rilate al la indikitaj varoj.

Ĉiukaze svarmo da esperantlingvaj leteroj de IKEF-anoj direktiĝu al mozaj entreprenoj!

Eble vi povas lanĉi saman eldonaĵon ĉe la IKĈ de via regiono, montrante la ekzemplon de la moza IKĈ.

*Franz Josef Braun*

## Administrado

**Grava atentigo al niaj membroj!**

1. La estraro prezentas sur la paĝoj 5 ĝis 7 sian raporton pri la agado de IKEF dum la jaro 1991 kaj proponas aprobon de tiu raporto.
2. La Estraro prezentas sur la paĝoj 10 kaj 11 la financan raporton de IKEF por la jaro 1991, notante ke la ciferoj prezentitaj en bona tempo al la kontrolo de la revizoro. D-ro Polerani juĝis ilin bonaj kaj en ordo. Tial la Estraro proponas aprobon de tiu raporto.
3. La estraro notas la sumon de financo gajno de 6835 BEF kaj proponas aldonon de tiu gajno al la kapitalo.
4. La estraranoj s-ro Braun kaj d-ro Picasso, elektitaj perpoŝte en 1990, baldaŭ estos du jaroj en siaj oficoj. Laŭ statuto de IKEF, alineo 7.1 dua frazo, estrarano tenas sian oficon dum du jaroj. Do ilia estraraneco finiĝos en julio ĉi-jare. Reelekto eblas. S-ro Braun pretas denove kandidatiĝi; d-ro Picasso ne plu volas esti estrarano, escepte ke ne prezentiĝas alia kandidato.

   En la nomo de IKEF, la aliaj estraranoj dankas ilin pro la laboroj faritaj dum la pasintaj du jaroj; ili ankaŭ proponas al la membraro reelekton de s-ro Braun kaj alvokas la membrojn pri sinpropono al kandidatiĝo pro la vakiĝonta estrarposteno. La nova estrarano prefere povus roli kiel Ĝenerala Sekretario por senŝarĝigi la Prezidanton de tiu funkcio.
5. Nia statuto, alineoj 7.4 kaj 8, montras la proceden pri aprobo kaj de la raporto pri agado kaj de la finfanca raporto, kaj pri elekto de estraranoj. Ĉi-jare ni denove aranĝos Ĝeneralan Kunvenon por nia membraro, kadre de la Universala Kongreso en Vieno, Aŭstrio. Diskutado pri kaj aprobo de la raportoj (vidu Punkton 4 supre) okazos tie. Membroj kiuj ne povos veni al Vieno, rajtas skribe komisii alian membron ĉeestontan pri aprobo kaj voĉdonado; tiun agon la Estraro rekomendas.

*La Estraro de IKEF*

## Entreprenistaj Strategioj - Priskribo de la entrepreno

**De d-ro Werner Bormann, Hamburg, IKEF-membro, asociita docento de AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj, San Marino), Broŝuro 64-paĝa, mendebla ĉe la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Prezo: 5,10 guldenoj.**

/FJB



## Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 1991

**Membraro denove kreskis**

Dum la jaro 1991 la membraro denove kreskis, nome de 85 al 102 membroj. Post la forpaso de la Dumviva Membro s-ro Willy Voit (IKEF 17) ni ne plu havas Dumvivan Membron.

**"La Merkato" iom stumblis**

Dum nia komunikilo La Merkato en la antaŭa jaro 1990 regule kvarfoje aperintis, ĝi iom stumblis en la raportjaro 1991. Aperis nur du numeroj, Kaŭzo estis personaj problemoj de la farintoj, ĉefe de nia redaktoro. Ni klopodas reveni dum 1992 al denove regula aperritmo.

**Terminara laboro antaŭ nova sukceso**

La Terminara Sekcio de IKEF sub kunordigado de s-ro **Wiersch**, Welzheim, Germanio (IKEF 19) daŭrigis sian laboron. Ĝi estis finpreparonta la tradukon de la EK-terminaro "Economie - Finance - Monnaie" (Ekonomio - Financo Mono). Ĉi tiu laboro estas prezentota komence de 1992 al la Komisiono de la Eŭropa Komunumo en Bruselo kaj estos aĉetebla dum la UK en Vieno.

**Verka agado malfortiĝis**

Bedaŭrinda afero estas la regreso de verka agado dum la raporta jaro. Sole la "Ekonomia Bulteno pri Usono" de nia membro d-ro **Goldman** (IKEF 52) regule ĉiumonate aperis kaj liveris valorajn informojn pri tiu giganta merkato. Ĝian abonon ni varme rekomendas al nia membraro. La klopodoj, trovi raportantojn pri similaj aferoj en Eŭropa Komunumo kaj orienta Azio (Japanio + la "Kvar malgrandaj tigroj") ĝis nun ne estis sukcesaj. Ni denove alvokas kapablajn membrojn el Eŭropo kaj orienta Azio al tia agado. Kvaronjara raporto sufiĉus. Taŭga tribuno por tiaj artikoloj estas la revuo Monato, kiun ni ja ĝenerale uzas por nia verka agado. Bedaŭrinde regresis kaj nombro de artikoloj de IKEF-anoj en Monato kaj la nombro de peritaj reklamanoncoj de entreprenoj en Monato. Fokuso, popularscienca serio de Hungara Esperanto-Asocio, ĉefe ellaborita de la Ekonomikista Grupo de HEA (nomita EKOESO, niaj membroj, IKEF 24), ĉesis sian aperadon pro la konataj financaj problemoj en nuna Hungario.

Sukcesan agon faris nia membro d-ro Werner **Bormann**, Germanio (IKEF 27) kiu konstante lekcias en AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj), kaj kiu eldonis novan 64-paĝan broŝuron "Entreprenistaj strategioj".

**Statutomodifo ne aprobita**

En La Merkato n-roj 32 kaj 33 aperis alvokoj al ideoj pri ŝanĝo de nia statuto, ĉar unu membro estis dezirinta tian

modifon. Venis neniu serioza reago el la membraro al tiuj alvokoj. Tial la statuto ne modifiĝas kaj restas kiel aprobita dum la fondkunveno de IKEF 1985 en Augsburg.

**Praktikaj agadoj**

Dum la Universala Kongreso en Bergen, nia membro profesoro Bengt-Arne **Wickström** (IKEF 40) estis aranĝinta du vizitojn de IKEF-anoj kaj aliaj interesitoj ĉe la **Komerca Altlernejo** en Bergen kaj ĉe la norvega petrolkompanio **Statoil**. Krom detalaj klarigoj pri strukturo de petrolo sur platformo, la vizitintoj ricevis ampleksajn tagmanĝojn ĉe ambaŭ. Profesoro Wickström prizorgis la interpretadon norvege-Eperante. Per tio ni montris serioze la valoron de Esperanton al la ne-Esperantistaro.

La "**Juna Komerca Ĉambro**" en Oostende, Belgio, kune kun la Esperanto-klubo "**La Konko**" Oostende aranĝis kun ĉinaj entreprenoj komence de oktobro "Ĉina aktive", kontakttagojn pri ĉinaj varoj. Je la 5a de oktobro okazis esperantlingva simpozio. Partoprenis kelkaj IKEF-anoj, inter alie sur la podio s-ro Gregoire **Maertens** (UEA-estrarano, IKEF 29) kiel podiestro kaj de la ĉina flanko profesoro **Shen** Chenru (IKEF 74). Plie faris prelegojn s-roj Georges **Soissois** (IKEF 101), Kees **Ruig** (IKEF 68), Michael **Cwik** (IKEF 50) kaj Franz Josef **Braun** (IKEF 4). Estis ekzempla agado de IKEF-anoj. Raporton pri tio vi trovis en **La Merkato** n-ro 35; la UEA-revuo "esperanto" n-ro 1030 de oktobro 1991 dediĉis tutan paĝon sub la titolo "Ĉinoj komercas per Esperanto".

Membro nia, nome Alfred **Schubert**, Germanio (IKEF 126) kreis propran esperantlingvan gazeton pri anoncoj, nomita "Monda Merkato", kiu aperas kvarfoje jare. La Estraro de IKEF decidis utiligi tiun anoncgazeton por niaj membroj kaj sendigi la kvar numerojn de 1992 senpage (t.e. je la kosto de IKEF) al ĉiuj membroj.

**Ĝenerala Kunveno 1991 en Bergen**

La Ĝenerala Kunveno de IKEF-membroj okazis kadre de la 76a Universala Kongreso en Bergen, Norvegio, je la 28a de julio 1991. Ĝi elvokis grandan intereson. Krom 13 IKEF-membroj ĉeestis 26 interesitoj, kiuj vigle kundiskutis. La estraranoj Braun, Rotsaert, Gilbert kaj Yamasaki gvidis la kunvenon.

Ĉefa temo dum la diskuto estis la demando, kiel trakti la multajn proponojn/dezirojn/ofertojn pri varinterŝanĝo, kiuj nun venas de komercistaj Esperantistoj al ekssocialismaj landoj kaj Ĉinio kaj el landoj de la "Tria Mondo". La ĉeestintoj samopiniis pri tio, ke ellaboro de bona solvo pri tiu demando estas nuntempe la plej grava tasko por IKEF. **Tiuj proponoj/deziroj/ofertoj ne malaperu en rubujojn, sed estu diskonigitaj al interesuloj, tiel ke ekestu la ŝanco**



por la multaj bonvolemaj sendintoj de tiuj proponoj/deziroj/ofertoj seniluziiĝos pri la praktika uzo de Esperanto kaj perdiĝos por la movado. Tial la Estraro estis komisiita de la Ĝenerala Kunveno, ke ĝi ellaboru taŭgan programon por realigo de tiu afero, kaj la plimulto eĉ pretis akcepti kotizplialtiĝon kaŭzitan de tiu afero. Tia programo intertempe estas vigle diskutata inter la estraranoj kaj komence de 1992 aprobata.

**Resumo**

Kvankam la membronombro ankaŭ dum 1991 kreskis al rekorda alteco, kvankam la financa situacio de IKEF estas stabila, kvankam la prilaborendaj taskoj sur la kampoj komerco, ekonomio, ekonomiko estas senlimaj kaj estus fruktodonaj, ni bedaŭrinde unuafoje devis konstati regreson en la sumo de la praktikaj agadoj de IKEF-anoj.

Ŝajnas ke multaj el la novaj membroj atendas ian servadon al ili. Sed la Estraro atentigas pri tio, ke IKEF estas organizaĵo, kiu kunligas komercajn/ekonomi(K)istajn Esperantistojn pretajn pri - propra aŭ komuna - agado por la divastigo de Esperanto sur nia profesiaj kampoj komerco/ekonomio/ekonomiko. Do mi ĝojus, se la membroj farus ion tiusencan, sole aŭ komune kun aliaj. La Estraro planas publikigi en la venonta La Merkato kolektaĵon pri taŭgajn agadeblecoj.

*La Estraro de IKEF*

---

Kiel trakti dezirojn/proponojn/ofertojn pri komercado de Esperantistoj el ekssocialismaj landoj, el Ĉinio, el evoluantaj landoj kaj el aliaj landoj kun pagoproblemoj?

**"monda merkato" helpas**

Ĉiu IKEF-ano loĝanta en evoluinta ("okcidenta") lando ricevas nun multege da petleteroj laŭ la supre menciita speco. La ideo de la senditoj uzi Esperanton en komerco kaj per tio ankaŭ helpi al si mem. Tio estas bonega agado kaj ĝi tute kongruas kun la celoj de IKEF (vidu nian statuton, paragrafoj 4.1.4 kaj 4.1.6).

Kompreneble por ekhavi sukceson estas nepre necese ke la sendintoj ricevos eĥon al iliaj leteroj, alikaze tiuj Esperantistaj komercistoj en sia kredemo pri la utilo de Esperanto seniluzioniĝos kaj estos perditaj por nia afero. Konsidere al tiu situacio, dum nia lasta Ĝenerala Kunveno 1991 okaze de la UK Bergen, tiu temo fariĝis la plej grava.Vidu la jarraporton en ĉi tiu numero sub "Ĝenerala Kunveno 1991 en Bergen". Ankaŭ dum la simpozio je la 5a de oktobro 1992 okaze de la ĉina ekspozicio en Oostende,

Belgio, tio estis la plej grava temo.

La estraro tiutempe estis komisiita, ke li solvu tiun problemon.

Jen la solvo:

1. Estas gravege, ke tiajn petleterojn la adresato ne ĵetu en rubujon, se li/ŝi ne bezonas la ofertitajn varojn/servojn, sed ke tiuj leteroj estu disdonotaj al laŭeble plej granda ricevantaro. Nur tiam ekzistas la ŝanco, ke ili trafas iun interesaton.
2. Por atingi tiun celon, ni interkonsentis kun la eldonejo

   Linguistisches Bureau Alfred Schubert
   Weilheim, Germanio

   ke tiaj deziroj/proponoj/ofertoj aperu en konciza formo en ties "monda merkato", tutmonda informservo kaj anoncgazeto, kiu aperas kvarfoje jare.
3. La kostojn por tiaj anoncoj pagos IKEF, kondiĉe ke ili venis el la supre nomitaj landoj kun pagoproblemoj.
4. Interesatoj pri la anoncitaj varoj/servoj rekte kontaktu la sendinton. Se ekestas komercado inter ambaŭ, la vendisto estas petata, ke li pagu al IKEF konvenan procentaĵon el sia tiurilata vendosumo.
5. Kiel "kompilisto" por tiaj anoncoj funkcias s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio. Do, ĉiu ricevanto de tia letero pri deziro/propono/oferto

   tuj plusendu ĝin al s-ro Rotsaert
   sen respondo al la sendinto.

   S-ro Rotsaert informos la originan sendinton pri la baldaŭa anonco en "monda merkato" aŭ pri nerealigeblo.
6. Ĉiuj IKEF-membroj ricevas "monda merkato" senkoste. IKEF pagas por ili la sendostojn. Unuafoje ni ricevis la numeron 1992/1 antaŭ kelkaj tagoj.
7. Ĉiuj IKEF-membroj estas petataj, ke ili trastudu la anoncojn en "monda merkato" pri ofertoj interesaj por ili.

   Tio validas ankaŭ por tiaj IKEF-anoj, kiuj ĝenerale aŭ profesie ne komercas/negocas. Tamen povus troviĝi en "monda merkato" anonco interesa por konato, parenco, najbaro aŭ kolego. Tiukaze la IKEF-membro traduku la anoncon nacilingven pro sia konato/parenco/najbaro/kolego, kaj en necesa esperantlingva korespondado kun la origina sendinto de la anonco li helpu ĉe tio.



8. Ĉi tiu reguligo validas por 12 monatoj, do ĝis 31a de marto 1993. Komprenenble ĝi estas iom kosta, sed IKEF volas per tio kontribui al sukcesa plenumado de tiu afero. Laŭ la gajnitaj spertoj, post 12 monatoj ni eble devos modifi tiun reguligon.

   Por la Estraro
   *Franz Josef Braun*

---

**Komercdeziraj leteroj!**

**Korektigo/Ŝanĝo (de numeroj):**

S-ro Lineckij **Miĥail**, Centro "Esperanto", SU-254200 Kievo-200, P. O. Kesto 539/1, Tel: 044.4328777, pro malkontenta servo de la ĉefposteja telex kaj telekopiilo ĝi ne plu estas uzata de la Centro "Esperanto".

S-ro Lineckij **Miĥail** sin prezentas kiel "komunikanto" en Ukrainio por enpenetri ankoraŭ ne formiĝintan merkaton.

**Rollagroj:**

La Komerca Fakgrupo "La Rollagro"
Platforma industriala Scheia, RO 5800 Suceava, Rumanio
Tel: 0040 987 22452, Telex: 23303, Telefax 25947

Privata kontakto je: Ionel Bodale,
Calea Obcinilor Nr. 3 Bl. 3 BIS Ap. 22 Et. 8
RO 5800 Suceava, Rumanio

**Serĉas informojn pri la aplikado de Esperanto al la komerco:**

Entrepreno kiu uzas Esperanton aŭ sciigoj pri traduka reto estas atendata de: S-ro Stéphane Dupin
90 Bis rue Rpger Salenger, F-94490 Ormesson

**Negoco en Germanio:** Petu informojn je

S-ino Irene Sosnoski, Brühl 13, D-o7241 Großbardaŭ, Germanio

**Komercaj rilatoj estas serĉataj de:** Esperanto-buroo Kemespo, S-ro Naumo **Kovnators**, 229700 Liepaja, a/k 7, Latvio
telefono de direktoro: 2-94-51 (01334)

**Pri turismo al la Okcidento:** vi laŭplaĉe kontaktu s-ro H. Al-Amily, 134 Brent Road, Southall, UB2 5LD, (Gr. Londono), U.K. (Britio), Fakso (telekopiilo) 071-828.9316

**Ekspluata entrepreno fondiĝis en Ĉinio:** je via servo:

Dir. Jun Zuo, adr: 705 Room No 100 Shang Qin Lu
CN-710005 Xi'an, Ĉinio, tel: (029)710147, Fakso 713897

/dk

## Financa Raporto

La spezokonton pri 1991 montras malnetan gajnon de 33.801 belgaj frankoj. Por tiu nekutime alta sumo estas diversaj klarigoj. Ĉar nur aperis du numeroj de La Merkato, estis malpli da elspezoj. Je la enspeza flanko notindas granda donaco (de 1.000 germanaj markoj) kaj pago pro revizia laboro (de 12.062 belgaj frankoj) kiun membro disponigis al IKEF.

La rezulto estis unualoke destinita al:

- deskribo de la stokvaloro de Komerca Terminaro al "p.m."-valoro;
- rezervo por senpage disponigi la novan identecŝildaron al la membroj, kiel kompenson por la ne-aperintaj numeroj;
- aldono al la subtena fondao, per kiu IKEF i.a. helpos diskonigi komercajn proponojn el nepagipovaj landoj.

Restas neta gajno de 6.835 belgaj frankoj.

Mi povas prizorgi presadon (sur bazo de pretaj A4-folioj) kaj aerpoŝtan forsendon de broŝuroj, revuoj k.s. je tre interesaj prezoj.

Kontaktu: Georgij TUJAKIN
33A-114, Kornejĉukstr.
127543 MOSKVO



**Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo**

**Spezokonto kaj bilanco por la jaro 1991** (en belgaj frankoj)

| Kostoj | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | Rimedoj (1991) |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Ĝ[illegible]laj kostoj | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | 30 370 |
| E[illegible]j term.lac. | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | 22 43[illegible] |
| Kostoj de "La Merkato" | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | | | |
| Kostoj de afranko k.s. | 5 [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | 14 53[illegible] |
| Kostoj de informado k.s. | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | | | 903 |
| Eldono identecŝildaro | [illegible] | [illegible] | - | [illegible] | | | 65[illegible] |
| Malneta gajno de la jaro | | | [illegible] | | | | |
| - deskriboj | | | [illegible] | | | | |
| - reservo identecŝildaro | | | [illegible] | | | | |
| - aldono al subtena fondaĵo | | | [illegible] | | | | |
| Neta gajno de la jaro | [illegible] | | [illegible] | [illegible] | - | [illegible] | - |
| | ------ | ------ | ------ | | ------ | ------ | ------ |
| | [illegible] | [illegible] | [illegible] | | [illegible] | [illegible] | 68 796 |

| Aktivo | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Komerca terminaro (stokvaloro) | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | - |
| Biblioteko, ekipaĵoj | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] |
| [illegible]kkonto belga | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] |
| [illegible] ĉe UEA | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] |
| Konto ĉe Flandra Esperanto-Ligo | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | | | [illegible] |
| Ŝparkonto ĉe Flandra E-Ligo | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] |
| Kurantaj kontoj estraranoj | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] | | | |
| | | | | [illegible] | [illegible] | [illegible] | [illegible] |
| | ------ | ------ | ------ | | ------ | ------ | ------ |
| | [illegible] | [illegible] | [illegible] | | [illegible] | [illegible] | [illegible] |

**Bonvenon al niaj novaj aliĝintoj!**

S-ro Maurits Van der **Bruggen**, (IKEF 142),
Grote Baan 81, B-9250 WAASMUNSTER, Belgio

S-ino Ursula **Zilvar**, (IKEF 143),
Grubenhagenstr. 8, D-W-3420 HERZBERG, Germanio

**Nagoja Esperanto-Centro**, (IKEF 144), J-461 Nagoya, Higasi ku, Higasi Sakura 2-13-23, Tôsinbiru 204, NAGOYA, Japanio

S-ro Jerald T. **Veit**, (IKEF 145),
446 S. Quaker Lane, WEST HARTFORD, CT 06110, Usono

S-ro Otto **Dengler**, (IKEF 146),
Forststrasse 9, D-W-7277 WILDBERG 5, Germanio

S-ro Edward **Symoens**, (IKEF 147),
Putsesteenweg 131 A, B-2920 KALMTHOUT (HEIDE), Belgio /RR/dk

---

**Identecŝildaro**

La nova identecŝildaro estas preskaŭ preta. Kiel jam anoncite, ĉiuj membroj de IKEF kiuj pagis sian kotizon por 1991 (aŭ poste), ricevos ĝin senpage, ĉar dum la pasinta jaro nur aperis du numeroj de La Merkato. /RR

---

**Ni serĉas mondvaste liverantojn pri materialo kaj pecoj por nia fabrikado de elektromotoroj malalttensiaj.**

Bonvolu anonci vin esperantlingve.

**Robert Bosch GmbH**
Uzino Bühl
Aĉetsekcio, Franz Josef Braun
Poŝtfako 1163
D-w7580 Bühl /FJB

---

Subskribintoj respondecas pri la enhavo de siaj artikoloj. La aperigo entute ne signifas samopinion, nek de la eldonanto, nek de la redaktoro.

La rajtoj de represo estas malferma, kondiĉe ke la fonto estas klare indikota. Pruvekzempleroj estas petataj.

**Reklamtarifoj**, en belgaj frankoj: tutpaĝe 1800; ½ paĝo 900; ¼ paĝo 500. 33% rabato por tri-foja sinsekva aperigo de la sama anonco. Membroj ĝenerale ricevas rabaton de 25%.

Akiri anoncojn estas ege utila rimedo por subteni nian movadon; eĉ duflanke ekonomie: finance kaj reputacie. /dk